



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio  
„La Estonto Estas Nia” - 33-a jaro n-ro 7/8

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.  
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

## LA EVOLUO DE NIA TEKNIKA KAJ SCIENCA LINGVO

(La verkinto de ĉi tiu artikolo, s-ro R. Eichholz, estas eldonanto de Esperanto-bildvortaro - vidu N.E. de junio pasinta. Krome li okupas sin i.a. pri la teknika kaj scienca Esperanto-terminologio. Pri tio li verkis artikolon, kiun ni parte ĉi sube presigas).

Ne mankas terminoj en nia poezia lingvo Ili laŭ mia opinio eĉ tro abundas. Sed nia teknika lingvo estas ankoraŭ subevoluinta. En la naciaj lingvoj multe pli da paĝoj presiĝas pri teknikaj temoj, kaj nur relative malmultaj pri poeziaj temoj. En esperanto ĝuste la kontraŭo validas.

Komparu nur la 22 paĝojn da belliteraturo en la lasta jarlibro de UEA kun la mizeraj iom pli ol 2 paĝoj pri scienco kaj tekniko. Ne miru do, ke ni ne kapablis entuziasmigi teknikistojn kaj sciencistojn pri nia lingvo.

Ĝuste la manko de moderna scienca kaj teknika literaturo malebligas al ni konvinki la gvidantojn de etaj nacioj, kiuj provas malliberiĝi de la angla-franca lingvo-imperialismo, pri la utilo de nia lingvo. Tiuj gvidantoj devas aspiri, ke iliaj popolanoj fariĝu sambone edukitaj teknikistoj kaj sciencistoj, kiel tiuj kies gepatra lingvo estas vaste uzata en scienco kaj tekniko. Sed per esperanto oni ankoraŭ ne kapablas akiri kompletan edukon. Do ili devas vole ne-vole daŭrigi

la uzadon de la lingvo de siaj iamaj mastroj.

Scienca kaj teknika literaturo ne estas kreebla sen ekzisto de klaraj precize difinitaj terminoj. Tro malmultaj troviĝas en Plena Vortaro (PV) kaj Suplemento (PVS). La Scienca kaj Teknika Terminaro (SST) elĉerpiĝis kaj malmoderniĝis, kaj la longe atendita Plena Ilustrita Vortaro (PIV) ekzistas ankoraŭ nur en manuskripta formo. Necesas do konsulti nacilingvajn vortarojn. La plej kompletaj kaj novaj „Grand Dictionnaire Eo-F” (GD) de prof. G. Waringhien kaj „Esperanto-English Dictionary” de M. C. Butler (BU) feliĉe enhavas multajn modernajn terminojn, tamen pluraj necesaj terminoj ankoraŭ mankas. Pro tio oni trovas la plej diversajn tradukproponojn por modernaj ĉiutagaj terminoj.

Por la angla „computer” oni trovas la jenajn tradukproponojn: komputilo, komputmaŝino, komputatoro, kalkulmaŝino, kalkulatoro, ordinatoro, ordigatoro, komputoro, komputero kaj kompjutero. Dipl. inĝ. R. Haferkorn, la Direktoro de la Sekcio Teknikaj vortaroj de la Akademio akceptis post longa diskuto inter fakuloj la terminon „komputero” kaj jam publikigis ĝin en la ĵus de Esperanto Press\*) eldonita „technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto”. Tamen certe ankoraŭ pasos longa tempo ĝis oni ĝenerale akceptos unu solan terminon.

Ni fanfaronas pri centoj da fakvortaretoj en nia lingvo, sed kiel mi spertadis dum la kompilado de tradukoj por la Esperanta Bildvortaro, ilin ne akordiĝas inter si: En la „Enciklopedia Vortaro” (EV) de Wüster, en GD kaj en la „Teknika Terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj” (Jarlibro de UEA 1959, II) ekz. troviĝas „cemento” en la signifo de la 1-a PV-difino de cemento. Ĉar oni informis min, ke tiu termino troviĝas ankaŭ en PIV, mi listigis „cemento” en la presprovaĵoj de la Esperanta Bildvortaro (piednoto 1964).

Sed en la fina PIV-manuskripto ne troviĝas „cemento”, kio igas min nun forstrekii la terminon. Mi neniam ŝatis „cemento”, sed pli grava ol personaj preferoj estas por mi la lingva unueco.

Fakvortaretoj estas verkitaj kaj ordigitaj laŭ la plej diversaj vidpunktoj. Estas tre malfacile trovi kaj kompari la diversajn terminojn. Se mi provus traduki la germanan „Millimeterpapier”, mi povus facile fari tion per „milimetra papero”, sed ĉu anglo aŭ usonano, kiu nomas tiun paperon „graph paper”, komprenus la terminon? Hazarde mi trovis en la Fervoja Terminaro de Rosher (Jarlibro de UEA 1953, II) laŭ mia opinio pli bonan tradukon, nome „kverprofilo papero”. Se mi estus serĉinta terminon por „Millimeterpapier” mi neniam estus enkondukinta „diagrampapero”. Necesas do eviti la kreon de diversaj terminoj por la sama nocio. Tamen, se iu trovis pli taŭgan terminon, li havu la eblecon enkonduki ĝin. Spertoj ĉe la kompilado de tradukoj por la Esperanta Bildvortaro (DB) montris al mi, ke ellaborado de fakaj terminoj devas esti farata en komunua laboro de kiel eble plej multaj diversnaciaj fakuloj. Ĉiam denove montriĝis, ke la tradukoj pliboniĝas, se ankoraŭ aliaj kunlaborantoj ekzamenas ilin. Multajn plibonigojn mi povis noti post publikigo de la du unuaj presprovaĵaj serioj de DB. Tamen kontraŭvole mi sufiĉe ofte devas fari la decidon arbitre aŭ laŭ propra gusto. Se ekzemple s-ro M. Lewin enkondukis en sia „Meteologia Terminaro” (Jarlibro UEA, 1961, II) la terminojn meteo” kaj meteorologio”, anstataŭ „meteoro” kaj „meteorologio”, por klare diferencigi atmosferan fenomenon de aerolito, oni devas decidi ĉu akcepti pli klaran terminon, aŭ preferi la pli internacian, sed konfuzigan. En kelkaj kazoj mi provis solvi la problemon

(daŭrigo sur p. 66)

## ASOCIAJ INFORMOJ

### Jarkunveno

Dum la jarkunveno je la 25-a de majo 1968-a oni elektis kiel prezidanton s-ro J. Calado, kiu ekde la antaŭa jarkunveno estis aganta prezidanto. Oni ne elektis anstataŭanton por s-ro B. R. Beekhuysen Tiel la estraro de nia asocio nun havas sep anojn. Vidu por la tuta estraro la lastan paĝon de tiu ĉi numero.

### Ŝanĝoj en nia „Interna Regularo”

Pro la transiro de nia biblioteko al la Universitata Biblioteko de Amsterdam montriĝis necese ŝanĝi kelkajn artikolojn de nia Interna Regularo. (Algemeen Huishoudelijk Reglement).

#### Artikel 18.

- het jaarverslag van de algemene sekretaris;
- het financieel verslag van de algemene sekretaris;
- het verslag van de kaskontrole-kommissie genoemd in art. 37;
- bespreking van het beleid van het hoofdbestuur;
- bespreking van de inhoud van het orgaan;
- de begroting van het lopende jaar;
- de vaststelling van de afdrachten, contributies en bijdragen voor het volgende jaar;
- verkiezing van leden van het hoofdbestuur;
- de verslagen van de „komitatano(j)” en de „ĉefdelegito” van de Universala Esperanto-Asocio;
- het verslag van het scheidsgerecht genoemd in art. 47;
- vaststelling van datum en plaats van de volgende algemene jaarverg.

De onder a, b, c, f, i en j genoemde verslagen en begroting dienen uiterlijk een maand vóór de datum van de algemene jaarvergadering in het orgaan of zo nodig op andere wijze aan de leden bekend gemaakt te worden.

Op voorstellen genoemd onder g en h zijn de artikelen 19 en 20 van toepassing.

#### Artikel 30.

Tot de taak van het hoofdbestuur behoren o.m.:

- de aangelegenheden genoemd in art. 20 van de statuten;
- uitvoering en naleving van de statuten en reglementen;
- het benoemen van een of meer redakteuren van het orgaan;
- toezicht en controle op de stichting „Libro-Servo L.E.E.N.”;
- de handhaving van de door de vereniging aangepane verbintenissen;
- de algemene propaganda.

#### Artikel 45.

#### Bibliotheek

De bibliotheek van de vereniging is bij onderhandse akte van 25 maart 1964 in bruikleen afgestaan aan de Universiteitsbibliotheek van Amsterdam voor de duur van 30 jaren.

Een besluit tot het al dan niet voortduren van de overeenkomst voor de eerstvolgende duur van 30 jaren wordt door de algemene jaarvergadering genomen binnen 29 jaren na het aangaan van de overeenkomst.

In geval van opzegging van de overeenkomst door de Universiteit van Amsterdam wordt het hoofdbestuur met de zorg voor de bibliotheek belast.

Elk in Nederland woonachtig lid kan werken uit de bibliotheek lenen tegen de door de Universiteitsbibliotheek vastgestelde uitleenvoorschriften.

#### Artikel 48.

Ieder lid ontvangt bij toetreding tot de vereniging een bewijs van lidmaatschap, een exemplaar van de geldende statuten en het geldende algemeen huishoudelijk reglement en desgewenst de catalogus van de Esperanto-werken in de Universiteitsbibliotheek van Amsterdam, een afschrift van de overeenkomst alsmede een overzicht van de uitleenvoorschriften.

*Manuskriptoj por la septembra numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 15-a de aŭgusto. Ni nur akceptas ilin, se ili estas klare tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.*

*Ĉefestraro, administranto kaj redaktoro deziras al la legantoj agrablan kaj refreŝigan ferion.*

*La Redaktoro.*

### S.A.T.-Kongreso en Utrecht

La 3-an ĝis la 10-a de aŭgusto 1968 okazos en Utrecht la S.A.T.-kongreso.

Dum tiu kongreso oni povos viziti internacian interŝanĝbazaron kun ekspozicio, dimanĉon la 4-an de aŭgusto inter 12-17 horoj en la N.V. Domo, Oudegracht 245 Utrecht.

La enirbileto kostas gld. 0,75.

La luprezeto de tabloj por ekspozicii estas gld. 4,—. Por kolektantoj estos eldonataj du specialaj kongreskovertoj kun speciala stampo de P.T.T.

3 Semajnojn antaŭ la kongreso kaj dum la kongreso P.T.T. krome stamos la normalajn poŝtaĵojn en Utrecht per speciala stampo „Esperanto de taal voor internationale betrekkingen”.

Oni povos mendi la specialajn du kovertojn ĉe s-ro D. Goslinga, Spaaklaan 19, Utrecht (tel. 0 30-35335).

La prezo de komplete prizorgita koverto estas gld. 0,50 po ekzemplero.

Oni povos ĝirpagi la kostojn sur ĝirkonton 53 77 31.

### Esperanto-servo por fremduloj en Amstelveen

Nia samideano s-ro K. Ruig el Amstelveen, delegito de U.E.A. komunikis al mi jene:

„Mi kaptas la okazon koncize informi vin pri interkonsento inter la amstelvena V.V.V. kaj la Delegito de U.E.A. por Amstelveen. El ĝi sekvis, ke V.V.V., aperigis broŝuron pri Amstelveen en Esperanto;

troviĝas ŝildo en Esperanto en la montrafenestro de la V.V.V.-oficejo en Amstelveen;

V.V.V. faris stampilon kun teksto” K. Ruig, Sp. 1.122, Amstelveen, Del. UEA. Tel. 18609, volonte servos al vi”.

Esperantistoturistoj rajtas telefoni en la V.V.V.-oficejo al mi senkoste;

broŝuroj povas esti petataj nur de la V.V.V. oficejo;

leteroj en Esperanto ricevataj aŭ sendotaj de V.V.V. estos tradukitaj senkoste de mi;

por specialaj aferoj por aŭ pri Esperanto mi rajtas uzi ĉiajn V.V.V.-servojn;

V.V.V. rajtas uzi la Esperanto-kontaktojn kaj -spertojn se ĝi bezonas tiajn por siaj internaciaj eventoj aŭ organizo.

Mi opinias la iniciaton de s-ro Ruig sufiĉe grava por publikigi ĝin en nia organo,

por ke aliaj povu profiti de lia bonega ekzemplo kaj espereble klopu kunlabori kun aliaj V.V.V.-oficejoj favore al Esperanto.

Ni dankas s-ron Ruig por liaj informoj.

J. C. Heetkamp-Sensius,  
ĝen. sekretariino.

### Esperanto en anonco

En „Elseviers Weekblad” de 12-VI-1968 troviĝis anonco de la entrepreno Linde el Wiesbaden, Germanujo.

En la cetero nederlandlingva teksto estis graslitera Esperanto-teksto: „La ofertito de Linde: Hidrostatikaj movigoj por ĉiuj labormovoj de konstrumaŝinoj.

Aŭtomate. Senŝtupo”. Menciinde estas, ke Esperanto estis uzata senpere, sen ia ajn komentario.

### Esperanto-traduko de poemo de Lucebert

En la numero de decembro 1968 de „Ons Erfdeel” (Nia Heredaĵo), tutnederlanda trimonata kultura revuo, aperos laŭ speciala peto de la nederlanda poeto Lucebert lia poemo „Visser van Ma Yuan” en Esperanto laŭ traduko de d-ro W. A. Verloren van Themaat, apud tradukoj de la sama poemo en pluraj aliaj lingvoj, i.a. la angla, franca, germana, hispana, itala, sveda, rusa kaj japana. Same aperis jam antaŭe en ĉi tiu revuo aliaj nederlandaj poemoj kun diverslingvaj tradukoj.

Lucebert atentigis la redakcion de „Ons Erfdeel” al la traduko de alia poemo de li („Oogst”) en „Nederlanda Esperantisto” de decembro 1965, p. 114, ankaŭ fare de d-ro Verloren van Themaat.

„Ons Erfdeel” celas i.a. defendi la nederlandan lingvon kontraŭ lingva diskriminacio, ekz. en Franca Flandrujo, kaj diskonigi la nederlandan kulturon en la eksterlando.

Adreso de la redakcio kaj administracio: Kerkstraat 1, Raamsdonk-dorp, N.-Br., Nederlando. Jarabono kostas gld. 10,—, unuopa numero gld. 3,—.

Ĝirkonto: 108 41 98.

### „Ideala Esperanto-Biblioteko”

En „N.E.” de februaro 1968, p. 17 ni petis informojn pri la serio „Ideala Esperanto-Biblioteko”, kvino da verkoj, aperintaj ĉe la Presejo „Helmond”, Esperanto-fako, en Helmond.

De diversaj flankoj ni jam ricevis afablajn leterojn kun informoj. Estas ankorau tro frue por kompili finan artikolon. Pri unu pseŭdonimo tamen ni ricevis decidajn klarigojn de s-ro P. Ch. M. van de Vijver, nun loĝante en Eindhoven, kiu tradukis el la sama serio „Iris” de H. 't Sas.

S-ro Van de Vijver klarigis, ke R. Delpasko, kiu tradukis „La Morea Perlo” de D. Simson (=?), estas pseŭdonimo de P. A. Schendeler: P. A. Schendeler - Paskchen del R. - Pasko del R. - R. Delpasko.

P. A. Schendeler dum multaj jaroj estis ĉefestrarano de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj redaktoro de *Espero* Katolika. Li tradukis „Josef in Dothan” de Vondel en Esperanton.

### Esperanto kaj skoltismo

De la 27an- de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1968-a okazos en Southend-on-Sea, Essex, Britujo, Internacia Jamboreo por skoltoj el la tuta mondo.

La gvidantoj akceptis Esperanton kiel duan lingvon. La tendaraj afiŝoj estos du-lingvaj, la Diservo enhavos legaĵojn en Esperanto, k.t.p.

Malgraŭ la rekomendo de Lord Baden Powell en sia libro „Skoltado por Knaboj” (unua eldono) la Tutmonda Komitato de la Skolta Movado en 1934 esprimis malaprobajn pri la uzo de Esperanto inter skoltoj „pro tio, ke ĝi ne havas praktikan valoron”.

En la jaro 1964 la Tutmonda Komitato fine aprobis la Internacian Lingvon por la Interpretista Insigno, „ĉar ĝi montriĝis utila”. La nova decido ja estas venko por la Skolta Esperanto-Ligo, kiu dum multaj jaroj klopuadis por instigi skoltojn lerni Esperanton. La Ligo eldonas „La Skolta Mondo”. I

Interesiĝantoj povas skribi al la sekretario, s-ro J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam.

La organizantoj esperas multajn gratulotelegramojn en Esperanto, kiuj povus esti legataj dum la ferma ceremonio, okazonta je la 2-a de aŭgusto. Oni sendu ilin al s-ro Tim W. Parrinder (kiu mem lernis nian lingvon, (Scout Jamboree „Bel-champs”, Hawkey, Kockley, SOUTHEND-on-Sea, Britujo.

Ankaŭ leteroj estos bonvenaj.

### EUROPA FEDERALISMO KAJ ESPERANTO

S-ro inĝ. Dieter W. Klage, de la Esperanto Sekcio ĉe Euratom Petten (N.H.) kaj membro de Eŭropa Federacia Partio komunikis, ke dum la pasinta II-a E.F.P. kongreso en Göttingen (Germanujo), 3/5-5-1968, lia oficiala propono, signita de proksimume 40 delegitoj, gajnis sukceson. Ĝi koncarnis enmeti en la partian programon la rekomendon je studado kaj oficialigo de Esperanto en Eŭropo. Vidu N.E. de febr. 1968, p. 14.

Bedaŭrinde la multpromesaj ĵus komencitaj kontaktoj kun la prezidantaro de la germana E.F.P. ĉesis pro la subita morto de D-ro Wilhelm Hermann, kiu estis la U.E.A. komisiisto por la Eŭropa kampanjo.

D-ro Hermann ne plu aŭdis la eĥon je sia artikolo en la E.F.P. gazeto.

### KORESPONDPETOJ

Cseri Sándor, Epreserdö u. 34, BUDAPEST IX, Hungarujo, 30-jara ĵurnalisto, dez. kor. prefere kun ĵurnalista kolego pri literaturo, scienco, sporto k.t.p.

Nikola Dimitrov Gjurnev, 25 jara fraŭlo, Atanaska Dimitrova Gjurnev, 21-jara fraŭlino, Georgi Dimitrov Gjurnev, 16 jara lernanto deziras korespondi pri diversaj temoj; interesiĝas pri aŭtoj, sporto, gramofondiskoj, modo, medicino, moderna muziko, poŝtkartoj poŝtmarkoj k.t.p.

Arvo Toomsalu, V-Kingisepa 37-5, Viljandi, Estonio, U.S.S.R. deziras korespondi. Li estas lernanto de mezgrada lernejo; interesiĝas pri poŝtmarkoj, gulmarkoj, bildkartoj.

### KAMPANJO POR FORTIKIGO DE UEA EN LA JUBILEA JARO 1968

VI BEZONAS UEA, ĉar, en via intereso Universala Esperanto-Asocio *KOMPETENTE reprezentas* la interesojn de la Internacia Lingvo ĉe internaciaj instancoj; pere de CED *prizorgas* dokumentadon pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo; *organizas* la mondan informadon pri la Internacia Lingvo kaj *divvastigas* la lingvon en ĉiuj mondopartoj; *aranĝas* altnivelajn kongresojn, konferencojn kaj seminariojn; *kuraĝigas* la artan kreadon kaj evoluigon de la lingvo per Belartaj Konkursoj, Artaj Festivaloj, Internacia Somera Universitato, serio Oriento-Okcidento; *eldonas* tri revuojn, ampleksan Jarlibron kun amaso da fidindaj informoj kaj aliajn publikaĵojn; *prezentas* la maksimumon de ĉiaspecaj praktikaj servoj, precipe pere de la delegita reto, unika en la mondo . . .

UEA BEZONAS VIN por povi pli sukcese plenumi siajn taskojn kaj por doni al vi ankoraŭ pli da praktikaj servoj.

ALIGU JAM HODIAŬ KIEL INDIVIDUA MEMBRO DE UEA

1 9 6 8

SESDEKJARA DATREVENO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO Helpu la kampanjon por fortikigo de UEA en la Jubilea Jaro per tuja aliĝo aŭ pago de via kotizo kiel Membro-Abonanto.

Adreso de UEA: Universala Esperanto Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.

Franciszek Ksiegk, RUDA ŜE 1, str. Janasa 12/5, Pollando dez. kor. Kolektas pm., bildk.

S-ro J. K. Kuiler (iama membro de la sekcio Groningen), Mudgegonga 3737, Victoria-Aŭstralio, serĉas korespondon kun geesperantistoj nederlandaj (fervojistoj, ŝipkonstruistoj, kiuj deziras enmigri en Aŭstralio). Li estas invalida kaj ŝatus ankaŭ interŝanĝi fotojn kaj ĵurnalojn.

Dez. kor. tri 17-jaraj knabinoj el Italujo: Antonia Valtorta, via Carlo Villa, 6,20092, Ciussello Balsamo (Milano); Rose Ricujero, via Verdi, 30,20092, Ciussello Balsamo (Milano); Rachele Lomuscio, adreso ne indikita.

### SUBTENU LA MABESOONE-FONDAĴON

Kasistino: F-ino J. E. Prins, Hora Siccamasin-  
gel 294, Groningen - Poŝtĝirkonto: 81 58 89.

(daŭrigo de p. 62)

per voĉdonado inter miaj pli ol 100 kunlaborantoj (ekz. ĉu oni preferas la terminon „elektrona valvo” aŭ „elektrona tubo” - ili voĉdonis klare por valvo”). Sed ne eblas fari tion por ĉiu termino, por kiuj diversaj tradukoj ekzistas. Ankaŭ ne aperas sufiĉe da teknika literaturo en nia lingvo, por ke oni povu per ĝia esploro ekkoni la preferatan formojn. Ellaborado de kontentigaj fakaj terminoj estas antaŭkondiĉo por sukcesplene enkonduki esperanton en la koncernajn fakojn. Unuopaj personoj, eĉ se ili estas kompetentaj fakuloj, ne kapablas fari tion kontentige, ĉar ili ne povas konsideri la vidpunktojn de alilingvaj esperantistaj fakuloj. Necesas longdaŭra diskuto internacia. Ni devas stimuli tiun laboron laŭplane.

*S-ro Eichholz daŭrigas priskribante la sliparan sistemon kiun li uzas.*

*Mankas la loko por presigi ankaŭ tion ĉi. Tiuj personoj tamen, kiuj interesiĝas pri la sistemo, kaj volas kunlabori kun s-ro Eichholz ĉe la kolektado de taŭgaj sciencaj kaj teknikaj terminoj, povas peti ĉe la redaktoro de „Nederlanda Esperantisto” represaĵon de la tuta artikolo.*

*Jen sekvas la fino de la artikolo:*

Mi do alvokas ĉiujn fakulojn ellabori terminojn de iliaj fakoj kaj sendi al mi la manuskriptojn. Necesas ke tiuj enhavu krom la esperantaj difinoj tradukon en almenaŭ unu el jenaj naciaj lingvoj: angla, franca aŭ germana. La manuskriptoj estu tajpitaj sur folioj ne pli larĝaj ol 9.8 cm, por ke mi facile povu enmeti la materialon en mian sliparon.

Sed ne nur fakuloj, ankaŭ ordinaraj esperantistoj opiniantaj, ke ili kreis rekomendindajn terminojn, estas petataj, ke ili sendu al mi tiujn terminojn. Prefere la terminoj ne estu neologismoj, sed formitaj el ekzistantaj radikoj.

Ni ĉiuj kunlaboru por adekvatigi nian lingvon precipe sur la scienca kaj teknika

## TRA LA LIBRARO

*MARTA, de Eliza Orzeszko, el la pola lingvo tradukita de L. L. Zamenhof.*

*Kvara eldono, 214 pĝ., 13 x 19.5 cm. Eldonis: Editions Françaises d'Esperanto, 11 rue Vergnes, Marmande, Francujo. Prezo: 15 fr. fr. (43 steloj).*

Orzeszko estas konata precipe pro siaj rakontoj el la vivo de la polaj judoj. La temo de tiu ĉi romano tamen estas alia: la tragedio de virino kiu post la morto de sia edzo subite troviĝas en granda mizero, ĉar ŝi ne estas kapabla por gajni la vivtenadon por si kaj sia infano. La tiama malmoderna socio estis bazita sur fortoj viraj kaj nur tiaj virinoj kiuj diponis pri specialaj kapabloj, povis libere vivteni sin; por virinoj malpli instruitaj ne estis loko. Al tiaj ĉi apartenis Marta.

La romano prezentas seninterrompan ĉenon da zorgoj, malsato, mizero kaj mal-espero, tragedion kiu en nia moderna tempo nur malfacile estas imagebla. Tial ŝajnas al mi ke en nacia lingvo tia verko jam ne havus utilon. Sed alie estas en Esperanto, nur tial ke ĝin tradukis Zamenhof, kaj nur pro tio tiu ĉi reldono estas bonvena.

Komparante tiun ĉi produkton de Zamenhof kun modernaj verkoj en Esperanto, ni konstatas unue la grandan diferencan en stilo kaj vortuzado, sed due ankaŭ la ĉiam ankoraŭ ĝojigan fakton ke la Zamenhofaj verkoj legiĝas facile kaj flue, malgraŭ pluraj arĥaikaj formoj. Al tiuj apartenas precipe la sufiksoj *ad* kaj *emec*, kiuj faras la vortojn nenecese pe-

tereno, kie la plej granda bezono ekzistas.

Rüdiger Eichholz  
La dumtempa adreso de s-ro  
Eichholz estas:  
2427 Padstow Cres.,  
CLARKSON, Ontario,  
Kanado.

\*) *Nomo de la eldonejo de s-ro Eichholz*

### ĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

*Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.*

zaj. Per *ad* Zamenhof esprimis la durativan kaj iterativan sencojn de slavaj verboj, sed plej ofte en kazoj kie ni nun ne sentas por tio bezonon.

La nuna eldono estas nepre preciza transpreno de la tria; esprimo kaj vortoj nun konsiderataj nekorektaj, tamen reaperas en siaj originalaj formoj. Tio estas laŭdinda ĉar, se oni volus iel korekti, estus tre malfacile fiksi por tio limon.

Tre mallaŭdinda tamen ŝajnas al mi ĝia tipografia aspekto: tre kompakta preso en tro „grasa” litertipo, kio lacigas la interlineaj spacoj estas tro grandaj, kvankam ili havas la utilon tre ofte interrompi la kompaktan tekston. La mia opinio sengustaj desegnoj pli bone povus foresti.

Malgraŭ tiu ĉi kritiko mi rekomendas la eldonon al ĉiuj, kiuj deziras gusti la Zamenhofan stilon. Tiun stilon ni ĝuas precipe, legante la plurajn detaligojn kaj la filozofiaĵojn de personoj rolantaj en la tiutempe ankoraŭ simpla formo de la lingvo. Zamenhof mirige sukcesis esprimi ĉiujn subtilaĵojn de la pensoj.

La libro estas plaĉe bindita en blua tolo kun arta desegno, sed kun eraro en la nomo de la aŭtorino: Orzesko.

Estas rekomendinde ke la eldonejo havigu kun la libro folieton kun ĉiuj kompostaroj, kiuj malgraŭ precizeco tamen enŝoviĝis.

Tiucele mi mencias ilin: *maldoĉeco* 5/19 .. (.) 15/36, *meblajoj* 16/23, *virinoj* (-j.) 46/26, *-Aleĉjo*, (Aleĉjo-) 47/5, *ĉi* (ĝi) 63/9, *kuŝis* (kuris) 68/39, *Kion* (Kiom) 75/18, *tiu* (kiu) 89/28, *veturanta* (-an) 91/31, *iaj* (ŝiaj) 119/16, *reciproke* 124/29, *mallaŭte*, sen komo) 143/1, *hanas* (havas) 146/24, *logas* (loĝas) 165/2, *laid* (alia litertipo!) 175/32, *dedici* (dediĉi) 199/31, *sciis* (-s.) 205/19, *renverŝas* (-s-) 206/16.

G. J. D.

**DOKTORO ZAMENHOF, ESPERANTO kaj la ESPERANTO-MOVADO.**

*Kompilis kaj preparis f-ino A. J. Middelloop kaj s-ro Tj. Boersma; ciklostilita broŝuro 12-paĝa, 16.5 x 21 cm, kun verda kovrilo. Eldonis: Libroservo LEEN, Borniastraat 95, Leeuwarden. Prezo f 0,40.*

Tre modeste aspektanta informa broŝuro pri la precipaj faktoj el nia movado, kiuj bezonas scii ĉiu komencanto.

En sia enkonduka parolo la funkcia

prezidanto, s-ro Calado, klarigas la celon de l' verketo, aldonante ke por la elementa ekzameno la jam ekzistantaj verkoj pri historio kaj organizo estas tro ampleksaj. Pri tio li plene pravas: pro la ĝenerale tro detalaj temoj la komencanto ofte konfuziĝas, dubante kion li nepre devas studi kaj kio estas por li nur akcesora negravaĵo. Tiu ĉi verketo enhavas senescepte faktojn nepre studentajn, do ne lasas dubojn al la studanto. Pro tio ĝia apero estas tre laŭdinda.

Koncerne stilon oni povas meti al tia ĉi verketo nur unu postulon: klarecon; kaj ĉi rilate la simpla stilo plene konformas al la enhavo.

Ĉar ankaŭ ĝia prezo estas ekstreme modesta, la verketo verŝajne rapide elvendiĝos. Por esperanta dua eldono mi notu kelke da tajperaroj korektendaj: slavaj (slavaj) 5-13, Antonio (Antoni) 9-2, Kazimier (Kazimierz) 9-12, eldonante (-a) 9-18 kaj 10-1, Nederlanse (-dse) 9-23, utili (-igi) 10-16, Geneve (Genève) 11-19. Krome ŝajnas al mi preferinde meti la mension pri F.E.N. sur antaŭan paĝon (10), tuj sub la nomoj de la nederlandaj Esperanto-organizoj.

G. J. D.

## TURISMO

### Rondvojaĝo tra Turkujo kaj Irano

Pere de TEJO, Nederlando, ni ricevis anglalingvan informon pri 20-taga karavanvojaĝo tra Turkujo kaj Irano. Laŭ la letero la guidanto scipovas i.a. Esperanton. Specialaj rondvojaĝoj por Esperantistoj kun 10% da rabato. Oni sciigu pri dezirataj datoj. Prezo: 250 Us. dol.

Skribu al: Discover the Orient, Balin Oteli, Dilbekli Cami Cad. No. 8, Beyazit ISTANBUL, Turkujo.

**VOJAĜI TRA HISPANIO ESTAS FACILE**, eld. de Nacia Reto de Hispanaj Fervojoj (Renfe). 40-paĝa broŝuro kun multaj informoj pri vojaĝado per trajno tra Hispanujo. Bedaŭrinde la teksto enhavas multajn lingvajn erarojn.

Petu alsendon ĉe: Sinjoro Komisario de la

Comisaria de Información y Relaciones Publicas de la RENFE, Plaza Espana - Torre de Madrid 2a Planta,

MADRID (13), Hispanujo.

*M.C. v.d. Hoog - Waal. Hooplaan 164, tel. 65-0431*

## CEFESTRARO DE L.E.E.N.

- Prezidanto:** S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12, tel. 0 10-189481.
- Sekretariino:** S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, Den Haag-2033, tel. 0 70-669669.
- Kasistino:** S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort-Z., tel. 0 2560-7615.  
S-ro T. Boersma, Borniastraat 95, Leeuwarden.  
S-ro O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl., tel. 0 2209-565.  
F-ino D-dino A. J. Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum, tel. 0 32150-43320.  
S-ro R. Slot, Ernst Casimirlaan 21, Zeist, tel. 0 3404-15228.

## SEKCIOJ DE L.E.E.N. (SEKRETARIEJOJ)

- Alkmaar:** S-ino E. Box-Worp, Marijkelaan 5, Alkmaar, tel. 0 2200-12914.
- Almelo:** S-ino A. J. B. Vrolijk-Hemelman, Hofkampstraat 33, Almelo, tel. 0 5490-3373 *13373*
- Amersfoort:** S-ino G. Salomons-Ruardi, St. van der Hagenlaan 6, Amersfoort, tel. 0 3490-16817.
- Amsterdam:** D-ro W. A. Verloren-van Themaat, Vondelstraat 62, Amsterdam, tel. 0 20-181820.
- Anrhem:** S-ro D. de H. Groendijk, Pontanuslaan, Arnhem-3, tel. 0 8300-26699. *1 ma C. C. Borret - van Kijil Rodenburgm.*
- Boskoop:** S-ro W. Weerheijm, Berkenweg 39, Boskoop, tel. 0 1727-3441. *23 II*
- Deventer:** S-ino E. Rijsbaarmman-Adriaanse, Rembrandtkade 140, Deventer, tel. 0 5700-17786
- 's-Gravenhage:** S-ino I. M. J. Dijkhoff-Lenze, Van Trigtrstraat 20, Den Haag-2019, tel. 0 70-243923.
- Groningen:** S-ino N. C. Kutterman-van Goot, Bosboom Toussaintstraat 21, Groningen-6. *1 ma M. Dalgas Wellingde Rodenburgm.*
- Haarlem:** S-ino G. J. Rodenhuis Bell, Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout, tel. 0 23-41216. *Groning - 5 VI tel. 05900 - 25773*
- Den Helder:** F-ino W. C. van Nienes, Pasteurstraat III, Den Helder, tel. 0 2230-4173. *24 1216 III*
- Hilversum:** F-ino D-dino A. J. Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum, tel. 0 2150-43320.
- Krommenie:** S-ino J. van der Meulen-van Harten, Popelstraat 13, Krommenie.
- Leeuwarden:** F-ino Y. Weidema, Goutumerdijk 18, Goutum, post Leeuwarden, tel. 0 5100-20172
- Leiden:** S-ro René Wassenaar, Boerhaavelaan 49, Lenden, tel. 0 1710-53283.
- R'dam-Espero:** S-ino P. E. van de Werff-Geldmaker, Statenweg 168c, Rotterdam-4, tel. 0 10-280642.
- R'dam-Merkurio:** F-ino J. v.d. Hengel, Willem Nagellaan 16, Rotterdam-13, tel. 0 10-185432. *1 ma E. M. Meesboomel, Drenthelag 63*
- Utrecht:** S-ro F. Hoekstra, Prof. Sjollemanlaan 24, Utrecht. *U. 714752.*
- Zaandam:** S-ro J. Vis, P. J. Takstraat 64, Zaandam. *B. J. Dudink, Middevroenm.*
- Zeist:** S-ro P. E. Enklaar, Willem Pijperlaan 31, Zeist, tel. 0 3404-18076.

*forma Johs S-ino J. H. Hoekstra - Seiders.*

- Redaktoro N.E.** H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem-3, tel. 0 8300-26699.
- Administranto:** P. M. Mabeoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk, -2970, tel. 0 4310-3611.
- Presajo N.E.:** Van Liere n.v., Wilhelminastraat 96, Emmen, tel. 0 5910-11392.
- Sekr. F.E.N.** J. Th. Punt, Kenastraat 35, Utrecht, tel. 0 30-444516.
- N.E.J.:** R. C. Groenewold, James Wattstraat 75, K.654, Amsterdam-6, tel. 0 20-57181, toestel 654.

*komitee Kaitig VEA 2x*

*FEN 4x / Wim Hee -*